Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KAJ NOVZELANDO

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

PLENUMITA 21/06/2014 Cent sepdeka eldono 21/06/2014 SENDITA (unua eldono 26/09/2011)

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Nicole Else

SENDATA AL 275 La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

Brunaj literoj signifas reuzatan sed gravan informon **ABC malnova**

Nigraj literoj signifas novan aŭ ĝisnunigitan informon **ABC nova**

Ctrl+alklaku la verdajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Esperantajn ligojn

Ctrl+alklaku la bluajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Anglajn ligojn

Estontaj kompetentaj Esperantistoj aŭskultas la retradion ĉiun tagon http://members.aon.at/aldone/peranto/index.html




Kial donacoj stimulas nin

Ricevi ion donace, tio estas bela kaj feliĉigas. Sed tio ne estas la sola efiko: Dum iom da tempo malgrandaj donacoj igas nin pli kreivaj kaj pli saĝaj.


Mi ŝatas ĉokoladon en ĉia formo, precipe ĉokoladajn bombonojn. Antaŭ nelonge mi ricevis tiajn donace, kaj kompreneble mi ĝojis pri tio. Ĝis nun mi estis kredinta ke tia kunportaĵo en plej bona kazo iom plipezigos min. Sed se oni kredas usonan psikologinon, ĝi igas min ankaŭ pli saĝa, pli ideohava, pli malferma, pli kompatema kaj helpema, dum iom da tempo mi fariĝas pli bona homo.

La psikologino Barbara Fredrickson de du jardekoj esploras pozitivajn emociojn. Kaj al tio apartenas ĝojo, dankemo, sereno, intereso, espero, fiero, plezuro, inspiro, respekto kaj amo. La lasta okupas apartan pozicion, ĉar ĝi ampleksas la aliajn emociojn. La demando kiu okupis la psikologinon, estis: Pri kio servas bonaj sentoj? Timo, kolero aŭ abomeno tute klare servas al survivado. Ili helpas al ni, eviti danĝerojn aŭ reagi laŭ ĝusta mezuro en minacaj situacioj. Sed kio estas la biologia senco de ĝojo kaj optimismo? Ktp……. Klaku, Legu! Aŭskultu! Lernu! Spertiĝu!



Ĉe Lingvaj Festivaloj, ktp

Ni devas propagandi per fordono de la senpaga, 32 paĝa Ŝlosilo.



La ŝlosilo montras kiel logika estas Esperanto. Ĉu vi havas pli bonan metodon?

ISBN registrita kaj libreto presota.

<u>Estas senpaga donaco</u>

'RRP $2.00' donas aspekton de valoro por la eblaj librovendistoj.

Tilly Aston – la plej fama aŭstralia esperantistino,

pri kiu vi neniam aŭdis.



Aŭ eble, malsame kiel mi, vi jam sciis pri Tilly Aston, priskribita en nekrologo je sia morto en 1947 kiel "unu el la plej konataj blinduloj en la mondo."

Naskite en Carisbrook, Viktorio, en 1873, Tilly Aston estis aŭtoro, muzikisto, instruisto, kaj laboranto por la komunumo. Kaj ŝi estis blindulino, kiu laboris senlace por helpi aliajn blindulojn. Per Esperanto ŝi komunikis kun blinduloj en aliaj landoj kaj uzis iliajn ideojn por helpi blindulojn en Aŭstralio. Ŝi fondis "Association for the Advancement of the Blind" kaj tiu organizo iĝis la nuna "Vision Australia".



Ni povas vidi ŝin sur foto de la anoj de la unua aŭstralia kongreso en Adelajdo en 1911. Ray Ross menciis ŝin kelkfoje en sia “Esperanto en Aŭstralio 1905 – 1985.” Per tiu libro ni scias, ke fraŭlino Tilly Aston kaj prelegis kaj kantis sola en la unua kongreso. Sed mi ne dubas, ke pli da informo pri ŝi kaŝas sin ie en aliaj esperantaj dokumentoj, eble en la internacia asocio por blindaj esperantistoj. Mi revas, ke unu aŭ pli el niaj lertaj esperantistaj historiistoj esploros pli pri ŝi.

Sue Tully, membro de Historia-Societo de Carisbrook faris/faras multe de esplorado pri Tilly Aston, kaj raportas bonan progreson en projekto por krei memorig-centron por ŝi en Carisbrook. Ŝi planas oficialan malfermadon kun publikigo poste en ĉi tiu jaro, kaj invitos nin esperantistojn partopreni.
Pli da informoj senditaj de Sue Censi (nun Sue Tully) havas Katja Steele kaj Hazel Green.
Sendis Hazel Green

Ignite Sydney (http://www.ignitesydney.com) La evento kiu enhavos Esperanton okazos la 16-an de Julio ĉe "Oxford Art Factory - 38 Oxford St Darlinghurst" La pordoj malfermiĝas je la 6-a kaj prelegoj komenciĝos je la 7-a. Kompreneble ĉiuj Esperantistoj estas invititaj. Kutime partoprenas pli ol 500 homoj.






La Melburna Esperanto-Klubo

kunvenas ĉiujn lundojn, 6.30ptm ĝis 8.30ptm
ĉe Ross House, 247 Flinders Lane.

La Melburna klubo renkontiĝis hieraŭ (16/06/14). La ĉeestantoj estis Marcel, Jennifer, Michael, Joanne, Peter, Esther, Heather kaj Jim kaj ni ankaŭ havis la plezuron bonvenigi Charles el Adelajdo kiu vizitas Melburnon ĉi semajne. Ken daŭre malsanas kaj Karlo vojaĝis al Aŭstrujo pasintan Sabaton. Ni bonvojaĝis Esther kiu ferios en Portugalio antaŭ ol preni parton en la UK en Bonaero.
Heather



Uzu Esperantajn literojn Ĉ, Ĝ, Ĵ, Ĥ, Ŝ kaj Ŭ

Por facile tajpi la Esperantajn literojn:
A) Por literoj kun ĉapelo. Tajpu alt+6 kaj tiam la letero.
B) Por literoj kun hoketo. Tajpu alt+b kaj tiam la letero u aŭ U.

Provu ĝin nun.
Multajn aliajn literojn aŭ signojn vi povas tajpi per la sama metodo, ekz. alt +3 donos £, aû alt +shift + ; donos №.
Henry Broadbent

Tiu metodo ne funkcias sur mia komputila sistemo. SED eble ĝi funkcias ĉe aliaj komputiloj.
Provu! La uzo de Esperantaj literoj helpus Esperanton : Roger Springer

---

Mi uzas iMac kaj jes ŝajnas ke tio validas nur por tiuj komputiloj.
Amike, Henry

Ferio en Kanado en Agosto



"Dum la pasinta jaro kiam mi feriis en Kanado en Agosto , mi vizitis Vankuveran Insulon kaj restis dum kelkaj tagoj kun miaj longtempaj Esperantaj geamikoj Wally kaj Olga du Temple.
Ili estas vera Esperanta paro (renkontis unu la alian en Esperantaj kunvenoj en 1970) Ili ambaŭ estis preskaŭ la 'bazo ni diru' de la Kanada Esperanta Asocio. Wally dum jaroj estis la prezidanto de KEA kaj ankaŭ prezidanto de la UK en Kanado en 1984. Olga estris kaj ankoraŭ estras la Libroservon de KEA.



Sur la bildo vi povas vidi Wally staranta dum mi ludis pianon kiu estis ekstere sur 'ĝeteto' super la akvo!
La alia foto montras Olga kaj min sur ilia hejm-balkono kie dum la nokto vizitis multaj procionoj- almenaŭ 15 da ili, eble 3 familioj!
Mi scias ke tiu letero estas ege malfrua, sed pli bone malfrue ol neniam! "
Dankon kaj korajn salutajn al vi,
INDRANI

EsperantoTV http://www.esperantotv.net/

Pasintaj numeroj de 'Aŭstraliaj Esperantistoj'

Sur la **retpaĝo de AEA** http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

CRI online http://esperanto.cri.cn/ Bona Esperanto Bonaj Programoj



Esperanto-Domo Sidnejo

Aferkunveno je 11atm. Poste amuzkunveno kun manĝetoj.

La venonta kunveno okazos la 22an de Junio. La 4an dimanĉon de ĉiu monato.

Jen estas foto en Facebook pri la dimanĉa (15/06/14) kunveno por prepari la lingvan festivalon. Amike, Nicole



Saluton el San-Paŭlo, Brazilo!

Kun ĝojo ni tralegis la kortuŝan artikolon de s-ro Gian Piero Savio el Israelo en tiu alloga novaĵletero, kiun Vi dankinde sendis.

En ĝi nia samideano Gian Piero ameme parolas pri Brazilo kaj la brazila esperanta movado, kaj aparte pri la brazilaj junuloj. En la fino li sciigas pri la interreta ligo al filmeto, kiun produktis kaj diskonigis Legio de Bona Volo (LBV) omaĝe al la Monda Tago de la Tero.

Do elkore ni dankas Vin pro aperigo de tiu artikolo, kiu honore kuraĝigas la E-movadon de Brazilo, al kiu Legio de Bona Volo senĉese kontribuas ekde sia komenco en la jaro 1950.

Kiel danko jen al via koro kaj al ĉiuj viaj kunlaborantoj la suba eldiraĵo de la verkisto Paiva Netto: ***"Esperanto estas altega idealo, kaj ĝia ligiĝo al LBV alportas eksterordinarajn profitojn al la Homaro".***

Samideane kaj fratamike, Maria Aparecida www.bonavolo.com

AEA Informas

Aŭstralia Esperanto Asocio

ACN 121 495 789 C/- G.P.O. Box 2122, Melbourne 3001

pasinta kunveno Dimanĉon la 15-an de junio 14 ? Vidu AE 171

La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

La ‚Aŭstraliaj Esperantistoj' (AE) publikigas vidpunktojn en Esperanto, sendepende ĉu vi estas membro de kluboj aŭ asocioj.

Skribu al ĉirkaŭ 270 individuaj legantoj, sed en Esperanto, mi petas.

La Novaĵletero Aŭstraliaj Esperantistoj estas elsendata almenaŭ unufoje semajne

La novaĵletero 'Aŭstraliaj Esperantistoj' subtenas liberan sinesprimon kaj honestajn kaj senkaŝajn artikolojn. Sed ni rezervas la rajton modifi aŭ forigi viajn komentojn se ni konsideras ilin esti ofendaj aŭ tro malrespektaj. Ni nun provlegas ankaŭ la leterojn kaj korektas la mistajpojn kaj gramatikajn erarojn.

Se oni prokrastas ĝis perfekto, oni faras nenion, ĉar la morto atendas vin.

Ne Ĉagreniĝu! sed Parolu!, Skribu!,

http://ckuik.com/Esperanto Eniro je Multegaj Esperantaj videoj de Jutubo

Filmetoj de Gian Piero Savio **http://vimeo.com/album/2111699**

http://www.bookbox.com/ La rakontoj estas laŭtlegataj de diversaj personoj

The Simpsons https://www.youtube.com/watch?v=M_77-WMZ1nY

First name	Family Name	First name	Family Name	First name	Family Name	Maria	Jojkitty	Svetislav	Kanachki
Abid	Afridi	Crystal	Hill	Jaga	Oprzedek	Marika	Fox	Terry	Manley
Adam	Olechnowic	Dale	McManus	Jaiden	Golding	Marina	Lobanova	Thomas	O'Gliasain
Adrien	FOLLIN	Dan	no name	James	McElvenny	Marjorie	Johnson	Tiffany	Liu
Alan	Turvey	Daniel	Kane	Jane	Allen	Mark	Smith	Tim	Stackpool
Alan	Bishop	Daniel	Forrest	Jared	Martin	Mark	Pavic	Todd	Herbert
Alan	Mendelawitz	Danton	Black	Jason	Covell	Martin	Gray	Trevor	Steele
Alan	Dean	David	Dewar	Jay	Mooney	Marumi	Smith	Trish	O'Connor
Alan	Collinson	David	Ryan	Jeff	Cullinan	Mary	Mills	Vera	Payne
Amanda	Markham	David	Dalgleish	Jennifer	Birchall	Mason	White	Vicky	Crickett
Amy	Regal	David	Kidd	Jenny	Bishop	Matthew	Maguire	Volo	Gueltling
Andre	Samosir	Dennis	Murphy	Jim	Radford	Matthew	Meldrum	Yaw	Badu
Andrea	Witt	Dianne	Lukes	Jo	Turvey	Max	Wearing	Yvan	Serve
Andrew	Lutz	Dianne	Mitchell	Joanne	Johns	Michael	Waters	Yvan	Serve
Andrew	Adams	Dmitri	Lushnikov	Joffre	Bell	Mick	Gallagher	Yvonne	Harvey
Andrew	Maybury	Donald	Rogers	John	Fleming	Mike	Taggart	kevin	kenefick
Andrew	Spannenberg	Doug	Eising	John	Casey	Mike	Leon	Lauren Victoria	Smith
Angela	Chin	Duncan	McDonald	John	Forbes	Mikel	Rizo	Lenny	g-----b
Angela	Maag	Dzejlana	Haveric	John	Calder	Miranda	Lutz	Lev	Lafayette
Anne	Sanders	Edith	Mejia	John	Lang	Nancy	Roy	Linda	Fields
Archana	Joshi	Edna	Watson	John	Abood	Nicole	Else	Marc	James
Arnie	Schaaij	Eko	Nur Hidayat	John	Gallagher	Owen	Loneragan	Marc	Schmidt
Barbra	Treharne	Eleanor	Perno	John	Adams	Pamela	Fenton	Marja	Niesen
Barbra	Stephen	Elizabeth (Libby)	Mortimer	John	Massam	Patricia	Palmer	Michael	Zhang
Barrie	Cledsmith	Elrae	Adams	John	Garvey	Patrick (Lize)	Zhang	Morgan	Day
Barry	Healy	Erhard	Claus	Jonathan	Cooper	Paul	Gorny	Nigel	unknown
Benjamin	Hook	Erin	McGifford	Jonathan	Moylan	Paul	Green	Paul	Burger
Benno	Lang	Esther	Parris	Jorge	Gallegillos-Pozo	Paul	Desailly	Peter	Willshire
Beth	Wearing	Finnur	Larusson	Kam	Lee	Penny	Vos	Peter	Cummins
Beth Maree	Shields	Franciska	Toubale	Karin	unknown	Peter	Mitchell	Philip	Nichols
Bettie	Hart	Fujun	Xiao	Katarina	Taggart	Peter	Bird	Rainer	Kurz
Betty	Chatterjee	Gerry	Phelan	Katja	Steele	Peter	Burgoine	rani	lyons
Bharat	Ghiomire	Giles	Thomson	Kay	Andersen	Philip	Smart	Renjo	Oren
Bill	Starke	giri	Rao	Kehui	Bao	Rae	Watson	Richard	Penman
Birgitta	Carney	Glyn	Truscott	Keith	Bowling	Rees	Pearse	Shayne	Power
Blaze	Doric	Gordon	Coleman	Ken	Rolls	Richard	Delamore	Sibel	Lewis
Bob	Felby	Grace	Alvarez	Kep	Enderby	Richard	Marcus	Teodomiro	Clavis
Bradley	McDonald	Graham	Fennell	Kerry	Robson	Robert	Hoogenboom	Tim	Warren
Brendan	Linnane	Gregg	Libby	Kevin	Warburton	Robert	Budzul	Valencia	Tan
Brian	Barker	Gus	Faith	Kiah	Morante	Robert (Bob)	Bain	valery	matushkov
Brian	Dance	Hazel	Green	Kieu Tu	Duong	Roger	Springer	Cyrille	Hurstel
Brodie	May	Heather	Heldzingen	Kirsi	Rossi	Roger	Hill	Deshan	
Bruce		Helen	Webb	Laurie	Kirwan	Ronald	Gates	Francisko	Zilli
Caitlin	McCluskey	Helen	Palmer	Leonie	McGlashan	Rouan	van Ryn	Happax	Legomenon
Carol	Lutz	Henriette	Vanechop	Libby	Farris	Sandor	Horvath	Harold	Sĉmitz
Caroline	Turner	Henry	Broadbent	Linda	Danzer	Sandor	Monostori	Hermann	Kroppenberg
Catherine	Chen	Herve	Diviciacos	Louise	Blyton	Sandra	Connors	Ljiljana	Popovic
Chan	SY	Howard	Gravatt	Luke	Marsillo	Shane	Leddin	Marvin	Anderson
Charles	Stevenson	Hugh	Malcolm	Lumera	Nohill	Shirley	Gradussov	Olga	du Temple
Chris	Morrow	Ian	McArthur	Marcel	Leereveld	Shresta	Kishor	Paulo	Cesar
Chris	Krageloh	Ian	Green	Marcus	Dohring	Sidney	Wolifson	Peter	Weide
Christine	Paul	Ian (Jano)	Wylles	Marcus	Gabor	Siu	Chan	Renato	Corsetti
Christine	Holliss	Indrani	Beharry-Lall	Margaret	Chaldecott	Stephen	Landman	Ruth	
Claudia	Layton???	Indu	Thapalia	Margaret	Yue	Stephen	Pitney	Utho	Maier
Colin	Robinson	Ivan	Pivac	Margarita	Pavlova	Steven	Garamy	Wally	du Temple

Individuaj ricevantoj de Esperanto-elsendaĵoj per la reto kaj listigitaj en la adresaro de Aŭstraliaj Esperantistoj.
La noma listo de "Aŭstraliaj Esperantistoj" en havas homojn kun konata nomo kaj retadreso

Se vi deziras ke via nomo estu sur tiu listo de ricevantoj, abonu! rogerspringer@tpg.com.au

Se vi deziras ke via nomo ne estu sur tiu listo de ricevantoj, malabonu!

Se vi deziras ke nomo de familiano estu sur tiu listo de ricevantoj, informu min.

Mi povas krome plusendi mesaĝon al individuo kiu estas en la supra listo.

Mi ne donas adresojn al petantoj.

Viaj leteroj al AE, devas montri vian nomon kaj se vi deziras, retadreson se vi akceptas, ke ĝi estu montrata post via letero.
Mi ne aldonas iun ajn retadreson se la skribanto ne mem faras tion.

Ĉu vi ŝanĝos vian retadreson? Informu min. rogerspringer@tpg.com.au;

La adresaro de "Aŭstraliaj Esperantistoj" estas uzata krome por sendi Tamen Plu, Telopeon, urĝajn anoncojn kaj se vi deziras, vian bonan ret-gazeton al ĉiuj homoj listigitaj en la adresaro de Aŭstraliaj Esperantistoj.

LA ESPERO Esperanta himno Bonega por kunvenoj
Esperanta kunkanto (Karaoke) kun A-cappella Ĥoruso

La gastĉambro de EFNSK devas esti antaŭmendita per estontaj gastoj.
Neniuj Esperantistoj loĝas tie aŭ proksime por helpi gastojn, kiuj ne antaŭmendis.
Se eble antaŭmendu almenaŭ 2 semajnojn antaŭe. Tio helpas nin prepari la ĝastĉambron.

Interesaj faktoj

Mezura sistemo havas metron logikan facilan sistemon ekde 1795.
Lingvoj havas logikan facilan Esperanton ekde 1887.

Ĉu lernanto preferus lerni la metran sistemon aŭ la britan sistemon?

Muziko havas bekflutojn (school recorders) por instigi studentojn lerni pri muziko.
Lingvoj havas Esperanton por instigi studentojn lerni pri lingvoj.

Esperanto estas la 27a lingvo en la listo de lingvoj laŭ nombro de artikoloj en Vikipedio (entute 285 lingvoj estas uzataj tie).
En Hungario Esperanto estas elektebla lingvo kiel antaŭfako por universitataj studoj. Miloj da gestudentoj ĉiujare lernas Esperanton kaj plejparte poste denove forgesas ĝin, ĉar mankas al ili la kontakto al la lingvo.

Senpaga Freelang vortaro estas tre uzinda kiam vi skribas, legas per komputilo

Plena Ilustrita Vortaro (PIV) estas surrete. http://vortaro.net/

Uzu Esperantajn literojn Ĉ, Ĝ, Ĵ, Ĥ, Ŝ kaj Ŭ

Unu de la pli facila metodo **http://esperanto.typeit.org/ senpage aŭ**
eĉ Pli facila http://www.typeit.org/app/?lang=esperanto&side **$12.50c**

Aliaj solvoj
La specialaj Esperanto literoj estas ĉiuj en la ''Latin 3 Symbols'' supre dekstre sub ''Insert''. Oni alklakas ''Insert'' kaj dekstre aperas ''Symbols''. Oni povas instali la Esperanto literojn sur la klavaro.

aŭ

Por vindozaj komputiloj senpagaj Ek! aŭ Tajpi aŭ vidu sube
Angle http://en.esperanto.org.nz/how-to-learn-esperanto/how-to-type-esperanto-characters,
Esperante : http://eo.esperanto.org.nz/how-to-learn-esperanto/how-to-type-esperanto-characters

La epoŝta programo "gmail" de Google transsendas la esperantajn literojn tute bone

La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ 5 minutan aŭskult/legon tage.

Kurso de **Esperanto** - Main page http://www.kurso.com.br/index.php?en

lernu! - Learn **Esperanto** online. Live tutors, dictionary, books & music **lernu**.*net/*

Rekomendata Legado
"Mirmekobo," de Donald Broadribb www.gazetejo.org/eo/mirmekobo
"Tamen Plu" de Katarina Taggart. Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj
"Telopeo" de EFNSK Ni sendos kopion al niaj konataj retadresoj
"Esperanto sub la Suda Kruco" AEA www.esperanto.org.au info@esperanto.org.au
Via kluba Novaĵletero? Laŭ peto, ni sendos retkopion al niaj konataj retadresoj
La ĉiutaga eldono Esperanta Retradio retpaĝo por aŭskulti kaj legi Esperanton
http://esperantareradio.blogspot.co.at/

Eĉ la fuŝa studo de la angla faciligas la estontan studon de Esperanto en ne latin-alfabetaj landoj.

La Kluboj. Se la suba kluba informo eraras, ne plendu, informu min.

Kial? Ĉar AE informas la mondon. Roger rogerspringer@tpg.com.au

3ZZZ Radio Melburno http://esperanto-radio.com/3zzzradio

La Manlia Esperanto-Klubo. unua kaj tria Sabato. 10atm Roger Springer 02 9976 0632

La Brisbana Esperanto-Societo Kvara Sabato 1ptm Kay Anderson 07 3372 7006

La Brisbana Esperanto-Kafoklubo Kvara Sabato 3ptm

Esperanto-Grupo de Centra Marbordo Dua Dimanĉo 2ptm

La Tasmania Esperanto- Societo Jaŭde 7ptm

La Melburna Esperanto-Klubo Lunde 6.30ptm

Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Vendrede 5ptm

Esperanto-Domo, Sidnejo Tria Dimanĉo 12tm Roger Springer 02 9976 0632

Torkio Esperanto-Kafo-Klubo, – Viktorio Unua Sabato 1ptm 03 5261 2899

Esperanto en Sudaŭstralio The Box Factory, 59 Regent St South, ADELAIDE unua merkredo 08 8242 1460

Adelajda Esperanto-Grupo, Adelajda Esperejo, 81/9 East Tce, ADELAIDE ĉiu sabato 08 8359 3375

Esperanto League of Western Australia Inc. unua kaj tria Sabato (08) 9343 9532.

Esperanto in Australia Meetup group.

ORMARBORDA ESPERANTO-GRUPO
NOVKASTELA ESPERANTO-SOCIETO
TOOWOOMBA ESPERANTO-SOCIETO
SUDORIENTA ESPERANTO-KLUBO

Vortoj de "Lernu"

FLAGRI

1. Eligi tremantan rapide moviĝantan flamon:

La flamo de la kandelo flagradis en la aerblovo.
Dum krozo laŭ la rivero ofte flagris la pasioj.
Preskaŭ nenio videblis en flagreto de eta kandelo.

2. Intermite treme kaj skue brili:
La okuletoj de la bebo larme ekflagris - li tuj komencos plori.
Luna lumo flagretis sur la akvo.

3. Rapide tremi, skuiĝi en aero, flirti (se paroli pri malpezaj objektoj):
Dum la urba festo bele flagris diverskoloraj flagetoj.
La fenestro estis malfermita; vento flagrigis la kurtenojn.
Ŝi plaĉis al ĉiuj - sur ŝia vizaĝo ĉiam flagretis rideto.

DISOCII
Parte aŭ iom post iom malkombini:
Kristala prismo disocias lumon.
Lumo disociiĝas al spektro.
Dum elektroliza disocio oni ricevas diversajn substancojn.
La liberigitaj substancoj nomiĝas disociatoj.